



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj **Redakcio:**
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

EL CAMINO

Sumido en tinieblas, cual débil luz brilla
El santo ideal que seguimos.
Parece una estrella que en lo alto del cielo
El rumbo nos muestra preciso.
Ni miedo nos causan los vanos fantasmas,
Ni mofas del hombre, ni aciagos destinos,
Que es clara, directa y bien definida
La senda ideal que elegimos.

Sigamos valientes, sin de él desviarnos,
De nuestro ideal el camino:
La gota sutil con latir incesante
Perfora hasta el duro granito.
Valor y paciencia, tesón y esperanza:
He aquí las fuerzas, que en juego continuo
Nos llevan por pasos, tras duras jornadas,
A nuestro glorioso objetivo.

Sembramos sin tasa, con fe en el futuro,
La siembra, incansables, seguimos.
Se pierden semillas a cientos, a miles,
No importa, sembramos altivos.
«¡Cesad!»—nos advierten en burla los hombres,
«¡Seguid!»—nos susurra una voz al oído,
¡Seguid adelante! ¡Seguid sin desmayo!
¡Que en ello va el bien de los hijos!

Si largas sequías o vientos furiosos
Desgajan los tallos marchitos
¡Oh, gracias al viento, que con nueva savia,
La lucha mejor resistimos!
No puede morir nuestra brava falange,
Que en dura pelea su valor curtido,
Indómita avanza y verá cumplirse
Su noble y glorioso destino.

L. L. ZAMENHOF.
Traducción libre al español de
VICENTE INGLADA.

PANON NIAN ĈIUTAGAN...

—Ĉu, vere, onklino, vi ne estas kolerigita je mi?
—Kial? Vi ne ofendis min—diris la maljunulino.
—Eble ne; sed mi tion supozis. Kiam mi sendis
al vi la lastajn provizojn, mi inter ili metis pecon
da pano... mi ne suface pripensis... vi scias kiel mi
amas kaj respektas vin... pecon da pano oni
donas al almozulo, kiu alvenas antaŭ nia pordo,

sed al vi, ne; se mi estus pensinta iomete mi ne
estus farinta tion.

—Aŭskultu, filino; mi rediras, ke vi ne ofendis
min, sed, permesu ke mi al vi rakontu, kio al mi
okazis tiam. Vi bone scias ke mi laboras salajre;
dum mi havas taskon miaj klientoj subtenas al
mi; tial mi ne bezonas elspezi ion de la malgranda
salajro; mi ĝin enspezas por aĉeti nutraĵojn por
la tagoj en kiuj mi ne laboras; jen mia vivo, hel-
pata per viaj oportunaj sendaĵoj.

Tiam mi estis estinta kelke da tempo sen labo-
ro; mi estis elspezinta tutan mian monon kaj
konsumita tute miajn provizojn; tiun tagon mi
havis nenion por vespermanĝi, nenion; se mi al-
menaŭ estus havinta iom da pano...

—Sed, kial vi ne avizis al mi? Ĉu, vi ne scias,
ke mi rapide estus sendinta... mi ĉiam rekomendis
al vi, ke vi ne manku de la precizaj subtenoj...

—Aŭskultu, mi daŭrigas. Mi decidis enlitiĝi sen
vespermanĝi, kaj la sekvantan tagon viziti ami-
kinon... poste skribi al vi. Dume mi komencis
preĝi; Patro nia... Panon nian ĉiutagan... Subite,
iu frapis la pordon, mi demandis kiu estas?—kaj
respondis al mi la filino de la sendoservisto, kiu
alportis vian sendaĵon.—Bone—diris mi—jam por
morgaŭ estas solvita la problemo—mi malfermis
la korbon; jen garbanzoj, rizo, ĉokolado, sukero,
iom da mono, nul kio estas tio?, peco da pano!
imagu vi, se vi povas, mian gajecon, mian emo-
cion; mi prenis la panon, surgenuiĝis kaj ekplo-
ris; tiun nokton mi manĝis panon, nur panon; mi
ne volis ion pli.

P. BESCÓS.

VINTRA VESPERO

Vidi kaj ne kompreni, senti kaj ne kompreni,
ĉu ĝi estas certe vidi kaj senti por la homo? Vi
havas, antaŭ vi, grandegan libron, kaj vi ne scias
legi en ĝi unu vorton. Via personeco mem estas
por vi enigmo. Mi demandas al vi, kial tiu mal-
nova trunko el pinio bruliĝas kaj vi silentas;
kial tiu pokalo da vino vin varmigas kaj fortigas,
kaj vi ne kuraĝas respondi al mi.

La mondo, via patrino diris al vi, estas la ĉef-
sanktejo; la suno estas ĝia ora lampo, la steloj

giaj lampoj el arĝento; la ĉielo ĝia arkajo; la montoj ĝiaj altaroj kaj la kampofloroj ĝia nuancoriĉa tapiŝo. Sed post ĉio, kion vi konas de la mondo? La tero, kiun vi piedpremas, rulas sub viaj planadoj, la suno estas meze de la spaco, planedoj multe pli grandaj, ol la tero, rondiras en ĉiama movado ĉirkaŭ tiu lampego de l'tago.

Vi ne scias ĝin ankoraŭ kaj vi ne devas ignortion. Malfermu de hodiaŭ vian koron al la scienco; demandu aŭ demandu al vi mem la kaŭzon de ĉio.

F. PI Y MARGALL.

El la hispana lingvo tradukis,

J. DOMEQUE.

LA PACO KAJ ESPERANTO

Ĉi tiu temo estas jam tre konata de la plej granda parto el la geesperantistoj: tamen estas necese rememorigi ĝin kiam denove la milito minacas la mondan pacon kaj ĉiuj homoj terure rifuzas la ideon pri grandmilito.

Nune la tuta mondo suferas grandan krizon kiu multe priokupas al la homaro. Nia atento estas vigla antaŭ la, eble, gravaj okazintaĵoj, antaŭ la solvo de la tutlanda malfacila problemo, do, ĉiutage oni scias ke la tiel bela kaj amata paco estas en danĝero. Kiel eviti la danĝeron? La oficialaj organismoj laboras pri senarmigo; la Societo de la Nacioj klopodas por malpermesi ke la popoloj intermilitu, sed mankas la plej granda bazo por ke la paco sukcesu: la morala interkompreno de la popoloj.

La nacioj interrilatiĝas per siaj komerc-traktadoj: per la borsoj: per aliaj interkonsentoj k. t. p.; sed la popoloj morale sin nekonas kaj estas necese alproksimigi ilin per la humanigo de la ideoj, tio estas, humaneca idealismo. Humaneca idealismo estas ami unuj al aliaj kiel fratoj de granda familio, kiel anoj de tutmonda societo; sed kion oni ne konas, tion oni ne povas ami kaj Esperanto estas ilo kiu unuigas la homojn sen diferencigi rasojn, civilizojn, religiojn, morojn, lingvojn. k. c.

Esperanto, bela lingvo, belega ilo por koni la penson de la diverslandanoj! Ĝi liberigos al la mondo de ĝiaj kruelaj bataloj kaj malamoj, ĉar nur la grandaj idealoj bele sentataj kaj praktikataj de siaj anoj malaperigos la malbonajn pasiojn kaj la paco sukcesos.

JULIA BUENO.

Zaragozo, la 6^{an} de junio de 1932.

Izolita esperantisto faras por nia celo tiom kiom se li ne estus esperantisto. Li devas, do, esti ano de iu ajn Esperanta Societo.

TRANS LANDAJN LIMOJN

El la lando mia venas mia voĉo ĝis en la lando via. Parolas mia voĉo vortojn, kiuj transiras landajn limojn, ne perdiĝante en nekomprenebleco de al vi fremda lingvo. Ĉar lingvon mi parolas ne mian, ne vian, sed la lingvo, kiu portos miajn vortojn trans landajn limojn estas la *nia*.

Pri Hispanujo mi nur scias malmulte. Kaj tiun malmulton mi nur scias el historiaj libroj, kiuj ekzemple rakontas ke iam via reĝo ankaŭ regis nian landon, kaj ke nia lando 80 jarojn batalis kontraŭ la via por liberigi sin. Sed ankaŭ mi legis ke interdume la komercistoj fartis bone kaj ke en 1648 subite montriĝis granda amikeca inter mia kaj via popolo. Mi tamen opinias tiun amikecon nura aferprosperigilo. Ne tia estas la amikeco mia, kiu sendas elkorajn salutojn al vi gelegantoj de ĉi tiu gazeto.

Ĉu vi scias ke el via lando ĉiujare venas ĉe ni bonkora sanktulo? En la komenco de la decembra monato precipe la infanoj atendas Lin, la Sanktan episkopon Nikolao. Antaŭe li venis ŝipe kaj vizitis ĉevalo ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn de nia lando. Nokte li rajdas sur la tegmentoj, ĵetante frandaĵojn kaj ludilarojn tra la kamentubojn en la atendantajn ŝuojn de la esperplenaj infanoj. La malbonaj infanoj tamen tiun nokton de la 5.^a decembro ne trankvile dormas, ĉar ili timas la Nigran Pedron, la fidelan servanton de la Sanktulo, kiu tamen ne estas tiel bonkora kiel sia mastro. Kunportante vergon, la Nigrulo punas per ĝi la figeknabojn. Nuntempe la Sankta Viro venas aeroplane kaj rajdi sur la tegmentoj Li ne plu kuraĝas, ĉar radiomastoj malhelpas la fieran blankan ĉevalon kaj endanĝerigas la Episkopon. Tial li nun aŭtomobile vizitas la domojn por rekompenci la bonajn infanojn.

La infanoj de nia lando rigardas Hispanujon kiel Ĉielon, kie loĝas almenaŭ unu Sanktulo. Nur malgranda parto ne estimas vian landon. Sed tiu parto ne estas la pli bona, ĉar nur malbonuloj timas la Nigran Pedron.

Mi konsideras vian landon, kiel la loĝejon de Sankta Nikolao, do tre ŝatas ĝin kaj ĝiajn enloĝantojn. Mi ĝojas per Esperanto povi esprimi bondezirajn vortojn por via lando. Mi ĝojas ke mia voĉo povas atingi vin kaj ke mi en NIA Vivo trovas «Fratecon» same sinceran kiel mian.

Trans landajn limojn nia voĉo venas, dezirante al via lando prosperon, por ke vi povu vivi en ĝi bonfartantaj kaj feliĉaj.

P. M. BROUWER.

Nederlando. Den Haag.

MALNOVAJ PAĜOJ

EL HEINE

I

Ĉirkaŭe la rozo flirtadas senĉese
Kun amo la bel-papilio,
Kaj la papilion per flamo amema
Briligas la suna radio.

Sed kiun, eldiru, la rozo ekamis?
Eldiru al mi vi la veron,
Ĉu la najtingalon, la dolĉan kantiston,
Ĉu eble la stelon vesperan?

Mi tion ne scias, sed mi, mi adoras
Min ĉiujn, vin, suna radio,
Vin, stelo vespera, vin bel-najtingalo,
Vin, rozo, kaj vin, papilio.

II

Ho, amata, vi ne timu,
Restu tie ĉi trankvila.
Por ne esti forŝtelitaj
Ni ŝlosiĝos per riglilo.

Kiel ajn la vento blovas,
Ĝi la ĉambron ne atingos,
Ke ĝi l'domon ne bruligu,
Ni la lampon nun estingos.

Vi permesu vian kolon
Ĉirkaŭvolvi per la mano,
Por ke vi ne malvarmumu
Sen la varma ŝalo lana.

III

Kiam mi mian doloron sopiris,
Vi nur oscedis, nenion eldiris.
Nun, ĉar ĝi estas vestita per rimo,
Vi min laŭdegas kun granda estimo.

A. KOFMAN.

Eltirita el «Lingvo Internacia», n-ro 5^a, majo 1896.

VORTLUDOJ

En la studado de ĉiu ajn lingvo, unu el la plej grava taskoj estas la akirado de sufiĉa nombro da vortoj, de kiel eble plej vasta vortaro por faciligi la esprimadon. Tiun celon oni ordinare atingas praktikante la legadon, havante apude la tekstan vortaron kiel utilan helpanton. Tia, verŝajne, estas la plej konvena maniero, ĉar kompreneble estas tro enuige kaj, cetere neefike, pasigi la tempon tralegante vortaron por studi kaj lerni nekonatajn vortojn. Tamen, tio estas eble, sed necesas malaperigi la enuon kiu malebligas tiun praktikadon.

Laŭ pedagogia maksimumo, por la infana instruado estas tre efike «instrui ludante», kaj tiel oni povas fari lernante Esperanton. Kompreneble, ne

ĉiuj kiuj lernas Esperanton estas infanoj, sed ne estas sencencaĵo diri ke ni ĉiuj ŝatas amuzajojn, preferinde la instruajn.

El ĉiu ajn lingvo oni povas konstrui vortludojn, nomatajn hispane «calambur» kaj france «calembours» kio konsistas je la duobla senco donata al kelkaj frazoj aranĝitaj kun vortoj kies kunligado esprimas malsame ol ilia aparta prononcado. Certe la franca lingvo taŭgas plibone por tiuj vortludoj pro la malsimileco inter la skribado kaj prononcado kaj oni povas konstrui vortludojn kunligante vortojn kaj skribante vortojn, laŭsone similajn sed de malsimila senco kaj formo.

Mi montras kelkajn vortludojn kunligante vortojn kion oni povas konstrui en Esperanto serĉante vortojn en la vortaro.

Kiel vi farus por plibonigi la veteron en la Norda Poluso?—Tre facile. Mi metus multajn pinglojn piksupren en la tero, kaj tiel mi povus kuŝi sur tero «tro pika» (tropika).

Kial la Nacia Banko estas same ol monaĥejo? Ĉar tie oni rimarkas «pri oro» (prioro).

Inter fiŝovendistoj.—Mi vendas preskaŭ nenion. Kiel vi faras por vendi ĉion kion vi aĉetas? Tre facile. Jam delonge mi metis grandan afiŝon fiksi tan antaŭ la montrotablo, ĉar «super afiŝo» oni vendas plibone (supera fiŝo).

Mallerta skulptistino ĉagreniĝis antaŭ amiko parolante pri malĝentila sinjoro kiu diris al ŝi ke sia verkaĵo estis skulptaĉaĵo.—Mi komprenas tion, fraulino, «ĉarmo de li» (ĉar modeli) ne estas kion vi faras.

Oni povus ankaŭ konstrui vortludojn kun esperantaj vortoj kies prononcado estas preskaŭ simila, kvankam malsimila ilia senco. Tio estas grava afero kaj ni ĉiuj devas atenti la bonan prononcadon por eviti malagrablajojn. Pripensu kio okazus se iafoje partoprenanto en internacia esperanta kongreso, kie kunrenas gesamideano, el diversaj landoj, intencus diri ĝentile al belulinoj tion sekvontan:

«Kiam mi vidis vin en tiu balo, mi tuj komprenis ke vi estas bulgara virino. Ĉiuj ĉeestintoj diris vidante vin, kia vesto!, kaj certe, tio estis rimarkinda. Vi poste ĉirkauiris portanta grandan ŝakon, verŝajne tro pezan; viaj okuloj demandis, sed neniu akceptis la inviton timante fari malbonan rolon. Vi tre fiera levis la ŝakon al viaj ŝultroj kaj per tiu movo falis teren la ŝalo kiun vi portis... k. t. p.»

Kun malbona prononcado rezultus tio:

«Kiam mi vidis vin en tiu valo, mi tuj komprenis ke vi estas vulgara virino. Ĉiuj ĉeestintoj diris vidante vin, kia besto! kaj certe, tio estis rimarkinda. Vi poste ĉirkauiris portanta grandan sakon, verŝajne tro pezan; viaj okuloj demandis, sed neniu akceptis la inviton timante fari malbonan rolon. Vi tre fiera levis la sakon al viaj ŝultroj kaj per tiu movo falis teren la salo kiun vi portis...»

F. TURRIÓN.

SPRITAJOJ

—Kial vi parfumas vian naztukon per benzino?

—Tial, mi kredigas fraŭlinojn ke mi havas aŭtomobilon.

—Se la tuta mondo kantus dum sia laboro, ni ĉiuj estus feliĉaj.

—Sed mia frato ne povas ĝin fari ĉar li estas muzikisto kaj ludas klarneton.

—Ami, ĉu ĝi estas aktiva verbo?

—Jes, sinjoro; ĝis oni atingas kvardek jarojn oni konjugacias kaj poste oni deklinacias ĝin.

:: :: ĈE SORĈISTINOJ :: ::

(Daŭrigo)

En la plejparto de miaj alveturoj al la montaro mi devis pasi antaŭ la budo de la sorĉistino, lokita sur la ŝtonplena vojeto, kiam ŝi ekvidis min, ŝi salutis min kiel amiko, per plej afabla rideto de sia pergameneca vizaĝo, de proksime ŝi ekkantis la Vedan himnon; mi haltis por babiladi dum mallonga tempo kun ŝi, sur ĉio, kiam mi piediris; ŝi demandis al mi, scivolema, pri la malsanuloj, kiujn mi vizitos aŭ kiujn mi vidis kaj ne malofte ŝi permesis ellasi opiniojn de profesia kolego.

—Tiu mortos, certel

—Kial vi diras tion?

—Mi scias ĝin, mi scias ĝin, ŝi respondis sentence, tiel ŝi sciis, antaŭ multe da tempo, ke iu persono mortos, antaŭ, ol oni alvokis min.

Kuriozan okazon mi rememoras inter aliaj, kiu evidentigas la sagacecon de mia sorĉistino kaj ŝian admirindan trafecon.

Mi revenis vidi viron, je unua vizito, kaj mi diagnozis aneurismon de la aorto en periodo tre progresa; li estis fortika viro, kvardek jara, pri kiu ŝi diris:

—Tiu mortos, baldaŭ mortos, subite.

Kurioziĝis min la certigo kaj pro mia insisteco mi atingis scii, ke ia someran tagon tiu homo su-

prenirante la krutan deklivon, sentis sin malbonfarta kaj ŝancelante sidis sur ŝtono ĉe la pordo de mastrino Nemesia; ŝi flaris lian buŝon, ŝi certigis, ke li ne gustumis ian trinkajon kaj ŝi faris sian opinion, sian mortan prognozon, kiu ne malmutajn monatojn poste konfirmigis, ĉar la homo subite mortis, pro ŝiro de la aneurismasako, kiam li faris penon. Mia sorĉistino rimarkis la kapturniĝon ĉe sana persono, kiu ne estis ebria.

Oni vidis pro tio ŝian lertan observeman spiriton kaj la fundamenton de siaj sorĉaĵoj kaj demoniaj interkonsentoj.

La nepino Calixta, tridekjara, estis sensignifa virino, iomete stranga, apenaŭ ŝi parolis pli ol kio estis necesega, kaj se eble per unusilaboj. Ŝi estis, nedudeble, bela, kiel sensenta statuo.

—Kiel, kaj per kia klaso de aventuroj, mi demandis min, ŝi estis patrino de Rosiña? Kiam mi intencis tion scii per la maljunulino (ĉar per la intereso ne estis espereble) mi nur atingis konfuzajn frazojn: —«La sorto... aferoj de la mondo»... kaj nenion plu. Sed maljunulino el San Xurxo parolis al mi pri grava sinjoro, ĉasisto, kiu helpis vivi tiun genton je la malbonaj tempoj; ŝi rakontis al mi, ke tiu ĉasisto trovis Calixta'n ĉe senhoma ebenaĵo de montaro kiam ŝi, tre juna, paŝtis siajn kaprinojn... Tio estis ĉio, kion mi povis scii, kaj eble ne estis pli por rakonti.

Kontraŭe, Rosiña. Oh! Rosiña estis monta floro, ŝia vizaĝo brunigita de la suno kaj frapita de la hejlo ne konigis ŝian blankecon de gardenio; facilmova, forta, eleganta, kun mirinda muskolenergio, kun grandaj kaj nigraj okuloj, kiel tiuj de ciganino, rapida kaj vigla, ŝi sciis la neceson por gardi sin kaj ŝi posedis troajn rimedojn por sin defendi per si mem je la soleco de la monto.

Mi miris vidante sin grimpi tra la rokoj kaj salti tra la krutaj ŝtonegoj en konkuro kun la «Roxa» kaj la «Moura», kiuj estis siaj gimnasiaj majstriroj. Ŝi estis diskreta kaj gracie babilema ne alvenante al ĉarlataneco; de infanino ŝi ricevis la instruojn de l'maljunulino, kaj foje, je mia peto, divenis mian estontecon per la ludkartaro, kun granda spriteco.

Mi demandis al ŝi pri la lecionoj, kiujn al ŝi klarigis ŝia avino, kaj interrompis min.

—Sed ĉu vi ankaŭ kredas je la sorĉeco? Tio, kio okazas, estas, ke mia avino scias multe pli, ol ĉiuj tiuj ĉi mallertaj...

—Mi kredas tion, karulino, mi kredas tion.

(Daŭrigota).